

# Magi videntes parvulum

## Brevier-Himno

Kristnaska tempo > ekde Epifanio > horo de la legajoj

<i>Magi videntes parvulum eoa promunt munera, stratique votis offerunt tus, myrrham et aurum regium.</i>	La magoj venas al la beb' kun donoj el la orient', laŭvote regalante Lin per oro, mirho, oliban'.
<i>Agnosce clara insignia virtutis ac regni tui, Puer, cui trinam Pater prædestinavit indolem:</i>	El tiuj signoj, ho infan', ekkonu, ke la Patro Vin destinis por triopa stat', provizis per triopa don':
<i>Regem Deumque annuntiant thesaurus et fragrans odor turis Sabæi, at myrrheus pulvis sepulcrum prædocet.</i>	Or' montras, ke Vi estas Reĝ', incenso, ke Vi estas Di', kaj mirho, ke Vi estas hom' entombigota kun balzam'.
<i>O sola magnarum urbium maior Bethlem, cui contigit ducem salutis cælitus incorporatum gignere!</i>	Ho granda urbo Betleĥem, el ĉiuj urboj sola vi sukcesis, ke naskiĝis Li en vi, la elĉiela Sav'.
<i>Hunc et prophetis testibus isdemque signatoribus testator et sator iubet adire regnum et cernere:</i>	Lin, kiun la profeta vort' anoncis en la Sankta Skrib', la Patro nomas Sia Fil', de l' Dia Regno heredant':
<i>Regnum quod ambit omnia dia et marina et terrea a solis ortu ad exitum et tartara et cælum supra.</i>	De regno, kiu sternas sin tra ter', ĉiel', aer' kaj mar', de sunleviĝo ĝis subir', kaj de Tartar' ĝis en sublim'.
<i>Iesu, tibi sit gloria, qui te revelas gentibus, cum Patre et almo Spiritu, in sempiterna sæcula.</i>	Al Vi, Jesuo, estu glor', Vi montras Vin al ĉiu gent'. La Patro kaj la Di-Spirit' gloratu same en etern'.
<i>Amen.</i>	Amen.

latina T: Prudentius

E: Albrecht Kronenberger 2008,  
5-a strofo parte laŭ la germana